

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK

701902-B

Ĉielo kaj Tero

(The Heaven and the Earth)

MISTERO DE LORD BYRON



Esperantigis Doktoro Noël



NANCY'O

ESP. PRESEJO E. THOMAS, EN MALZEVILLO

1906

Ĉielo kaj Tero

(The Heaven and the Earth)

MISTERO DE LORD BYRON



Esperantigis Doktoro Noël



NANCY'O

ESP. PRESEJO E. THOMAS, EN MALZEVILLO

1906

701902-B

AL MIA AMIKO

INGENIERO FRÉCOT

La sindona propagandisto por Esperanto

Tiun ĉi tradukon, nur modestan
floreton en la brila krono de Esperanto,

Tutkore dediĉis

D^{ro} NOEL.

Nancy'o, Aŭgusto 1905.

PROZODIAJ MONTROJ

La signo - montras silabon longan.

La signo u montras silabon mallongan.

u - estas Iambo.

- u Troĥeo.

u - u Amfibrako.

u u - Anapesto.

- u u Daktilo.

Komo , disigas la piedojn.

Cifereto, superkuŝanta post piedo, montras nombron da ripetoj de la sama piedo.

Ĉiu ŝanĝo en la ritmo estas montrita antaŭ la komenco de l'verso.

PERSONOJ

Anĝeloj : SAMIASO.
AZAZIELO.
Ĉefanĝelo RAFAELO.

Viroj : NOO.
Filoj de Noo : ĴAFETO.
SEMĈJO.
IRDO.

Virinoj : ANĴO.
AHOLIBAMO (AHO).
UNU PATRINO.
UNU VIRINO.

Ĥoroj : SPIRITOJ DE LA TERO.
MORTEMULOJ.

La agado havas lokon en ĉirkaŭaĵo de Monto Araro.
— Lando kun arbaroj kaj montoj — Noktigas.



SCENO I.

ANJO, AHOLIBAMO.

ANJO.

u -³, u La patro dormas! Jen momento kiam
Kutimas niaj du amantoj al ni
Alflugi tra nebuloj, kiuj kronas
La supron de Araro! Kiel batas
En brusto mia koro!

AHO.

Nian preĝon

u -⁴, u Komencu ni!

ANJO.

Ankoraŭ steloj
Ne brilas! Ho, mi tremas!

AHO.

Ankaŭ

u -⁵, u Mi tremas; sed pro tim', ke ili
Malfruos!...

ANJO.

Kvankam mi, fratin', pli amas
Azazielon ol... ha!... Tro!... Ve, kion
Mi volis diri!... Koro malpiigas!...

AHO.

Ĉu malpieco ami Ĉielanojn?...

ANJO.

Mi malpli amas, Aho, nian Dion,
De l'tempo kiam amas min Anĝelo !...
Nebona certe tio !... Kaj mi, kvankam
Senkulpa, timas pro l'estonta tempo ! ..

AHO.

Kuniĝu do kun ia Tera filo,
Laboru pene; vin Ĵafeto amas
De longe; edziniĝu fine kun li,
Kaj nasku idojn je polvaja korpo !...

ANJO.

Azazielon mi ne malpli amus
Se estus li mortema ; sed mi ĝojas,
Ke li ne estas tia. Mi ne povas
Postvivi lin ! Je penso, ke senmortaj
Flugiloj liaj haltos sur la tombo
De Tera junulino, kiun li jam
Amegis, kiel li mem La Plejsupran
Amegas..., al mi, Morto ŝajnas malpli
Terura !... Tamen, mi kompatas pri li !
Ĉagreno lia daŭros dum centjaroj !
Doloro mia daŭrus ja senfine
Se estus mi Serafo, kaj li homo !...

AHO.

Pli prave diru, ke sur Ter', filinon
Alian li elektos, kaj li mem ŝin
Amegos, kiel li jam vin amegis !...

ANJO.

Se estus tiel... Se ŝi ankaŭ amus
Lin kiel mi... ĉi tion mi preferus
Ol vidi lin senĉese plori pri mi !

AHO.

Se mi ekpensus, ke min Samiaso
Forgesos, kvankam li Serafo, mi lin
Forjetus !... Sed nun horo !... Ni alpreĝu !...

ANJO.

u - u⁴

Serafo ! Min aŭdu de l'Supra Sidejo !
En kiu ajn astro vi brilas, ĉu gardas
Kun sep ĉefangeloj ĉielajn senfinojn,
Ĉu flugas per fajraj flugiloj tra mondoj,
Tra spacoj senlimaj... memoru virinon
De kiu vi estas amata ! Ŝi estas
Nenio kompare kun via grandeco !
Sed kredu, ke por ŝi, vi estas nun ĉio !
Ne scias vi la maldolĉecon de larmoj !
Mi sola ĝin konu ! Vi estas senmorta.
Ĉiela beleco de viaj radiaj
Okuloj neniam pereos ! Vi povas
Samideaniĝi kun mi nur per l'Amo !
Kaj diru ĉu jam Teranino, pli ame,
Pli dolĉe, sopiris pri vi, sub Ĉielo !
Traflugas vi mondojn sennombrajn, vi vidas
Vizaĝon de Tiu kreinta vin, kiel
Li faris min unu el lastaj kreitoj
De ras' el Edeno pelita ! Vi tamen,
Amata Serafo, min aŭdu ; vi amis
Min ! Morti ne volus mi antaŭ ol scii
Pri tio nur, kion mi scios post morto :
Ke vi ne memoras plu, en Eterneco,
Pri tiu de kiu eĉ Morto ne povis
Forigi amegon al vi ! Ho senmorta
Potenco ! Grandega ja estas amego
De ĉiuj estaĵoj amantaj en peko ;
Kaj, malgraŭ hontinda ribelo de l'timo
En mia animo, pardonu pro tiaj
Pensadoj filinon Adaman ! Travivas

Ni en malĝojego ! Kaj por ni, Feliĉo...
Nur estas Eden'... malproksima celajo,
Al kiu ni tamen sopiras en sonĝoj !...
Sed horo ĵus venis, en kiu vi montras,
Ke estas ni ne forlasitaj !... Aperu
Ho Azazielo Ĉiela ! Kaj lasu
La stelojn radii per propraj radioj !

AHO.

Kaj vi, Samiaso ! El kia ajn loko
De Mondoĵ sur kiuj vi estras... ĉu vi nun
Batalas Spiritojn ribelajn al Tiu
Venkinta per forto sur ĉiuj Potencoĵ...
Ĉu vi revojigas vagantan steleton
Tuj ekperdiĝontan en Profundegaĵo,
Kaj kies loĝantoj, per fino de vivo,
Elportas la saman Fatalon malĝojan
De l'polvo vivanta sur nia Terglobo,
(Ĝi, kiel ilia, al mort' kondamnita !)
Ĉu vi, kun mezgloraj keruboj, bonvolas
Kantadi kun ili... Mi vokas, atendas,
Kaj amas vin !... Estas kreaĵoj de kiuj
Vi preĝojn ricevas, sed mi vin ne preĝas !
Se via spirito al mi vin instigas,
Alvenu, ni kune samsorton elportu !
Sed kvankam mi estas el polv' eltirita,
Kaj vi, el radioj pli brilaj ol tiuj
De l'tag' al Eden' lumiganta, ne povos
Senmorta vi, mian amegon rebati
Per amo pli forta ol mia ! Mi sentas
En mia animo fajrecon venintan
De via radio... de Dia radio !
Sed nun mi ne povas ĝin klare briliĝi !
Ĝi eble ankoraŭ restados malluma ;
Ĉar Mort' kaj malbonoj ĝin antaŭirantaj,
Jen la heredajoj de Ev' la patrino !

Sed mia animo maltimas je ili !
Jes, vivo forflugos ! Sed ĉu ni disiĝos ?
Vi estas senmorta... mi estas, ja, tia !...
Mi sentas, mi sentas en mi Senmortecon !
Ĝi venkas dolorojn, kaj larmojn, kaj tempon,
Kaj timojn... ĝi laŭte ripetas kun vero :
« Vi ĉiam vivados ! » — Sed ĉu en feliĉo ?
Mi tion ne scias, kaj scii ne volas !
Ĝi estas sekreto de la Ĉiopova !
Li kaŝas la fontojn de l'Bon', de l'Malbono,
Li tamen ne povas detrui nin, nek vin,
Nek min ! Li nin ŝanĝos, sed ne neniigos !
Ni, kiel Li, estas el fonto eterna !
Se Li nin ekbatos, ni devas rebati !
Kun vi, mi elportos doloron senfinan,
Ĉar amis vi mian morteman ekziston !
Ĉu, ĉar vi senmorta, mi de vi forkurus ?
Ne ! Eĉ se serpento min pikus tra brusto !
Eĉ se vi mem estus simila je tiu
Serpento, kaj viaj volvaĵoj min ligus ;
Mi tiam dolĉridus sen ia malbeno :
Mi vin alpremadus per premo ne malpli
Amega !... Sed venu, akceptu sindonon
De ino mortema al vir' senmortema !
Se al vi Ĉielo pli da feliĉeco
Prezentas ol povas vi doni kaj ankaŭ
Ricevi ĉe mi... en Ĉielo nur restu !...

ANJO.

o -^s, o Fratin' ! Fratin', mi vidas ilin flugi
Al ni, kaj fulmi tra l'aer' malluma !

AHO.

Flugiloj nubojn pelas for, kaj ŝajnas
Alporti la krepuskon de l' mateno !

ANJO.

Se nia paĉjo vidus tiun lumon ?...

AHO.

Li kredus, ke ĝi estas Luno, kies
Leviĝon ĵus sorĉisto plifruigis !

ANJO.

Jen ili !... Jen li !... Jen Azazielo !...

AHO.

Ni tuj alkuru al renkont' de ili !
Ha ! Se flugilojn havus mi por flugi
Al brust' de Samiaso !

ANJO.

Vidu, ili
Heligis tutan Okcidenton, kvazaŭ
La Suno kuŝiganta iris reen !
Sur lasta supro de Araro, vidu,
Lumegas brila fasko milkolora,
Postsigno de ilia traflugado !
Sed vidu, jam la nokto refariĝis !
Leviatana ŝaŭmo tiel ŝprucas
El mar' senfunda, kiam monstro ludas
Sur la supraĵo de trankvilaj ondoj !
Sed tiu ŝaŭmo baldaŭ malaperas,
De kiam enakviĝis ree monstro
Ĝis fund' mistera de profundegaĵo !

AHO.

Jen ili tuŝis teron ! Samiaso !...

ANJO.

Azazielo mia !...

(Ili foriras.)

SCENO II.

IRDO, ĴAFETO.

IRDO.

Ne sopiru
Plu ! Kial tiel vagi ? Por aldoni
Silenton vian al silent' de nokto !
Por plori !... Por rigardi astrojn, kiuj
Nenian helpon povas al vi doni !...

ĴAFETO.

Sed ili min konsolas ! Eble ŝi, nun,
Rigardas ilin en samtempo kiel
Mi !.... Ŝajnas, ke kreaĵo bela estas
Pli bela per rigardo al belaĵoj
Similaj je ĝi, kaj precipe tiuj
Objektoj je belec' ĉiama !... Anĵo !

IRDO.

Sed ŝi ne amas vin !

ĴAFETO.

Ve !

IRDO.

Kaj fieraj
Aholibamo ankaŭ min malŝatas !

ĴAFETO.

Kompatas mi kun vi !

IRDO.

Ŝi gardu sian
Fieregecon ! Same, mi elportas
Malŝaton ŝian ! Eble Temp' min venĝos !

ĴAFETO.

Ĉu povas tia pens' alporti ĝojon?

IRDO.

Nek ĝojon, nek ĉagrenon! Mi ŝin amis!...
Mi estus pli aminta ŝin, se estus
Ŝi reŝuldinta min!... Nu!... jam nun, mi ŝin
Forlasas al pli bela sorto, se ŝi
Preferas tion!

ĴAFETO.

Kia sorto?

IRDO.

Ial,
Mi kredas, ke ŝi amas nun alian!

ĴAFETO.

Ĉu Anjo?

IRDO.

Ne, fratino ŝia!

ĴAFETO.

Kiun

Alian?

IRDO.

Tion mi ne scias! Sed ŝi
Per manieroj pli ol per paroloj
Min igas kredi, ke ŝi amas iun!

ĴAFETO.

Ne tia estas Anjo... ĉar ŝi amas
Nur Dion sian!

IRDO.

Ĉu Lin, ĉu alian!
Ne vin! Do, por vi, kia gajno?

ĴAFETO.

Vere,

Nenia ! Sed mi amas !

IRDO.

Kaj mi amis !

ĴAFETO.

Kaj kiam vi ne amas plu, aŭ kredas,
Ke vi ne amas plu... ĉu vi feliĉa
Pli estas ?

IRDO.

Jes !

ĴAFETO.

Ve al vi !

IRDO.

Al mi ? kial ?

ĴAFETO.

Feliĉa esti, kvankam ne havanta
Ci tion, kio faras min feliĉa !

IRDO.

Per tia diro, vi nur montras al mi
Malbonon de eraro via ! kaj mi
Ne volus pensi kiel vi, eĉ se pli
Da mono mi ricevus ol produktus
Vendado de ŝafar' de nia patro,
Kompense kun ĉi tiu monmetalo
Per kiu idoj de Kaino volas
Nin logi ; kvazaŭ tiu polvo flava
Kaj senutila, tera elĵetaĵo,
Kompensi povus lakton, lanon, fruktojn
De valoj niaj, de ŝafaroj niaj !.
Ĵafeto, iru, plendu antaŭ steloj !...
Bojadas ankaŭ lupoj antaŭ luno !...
Mi iras reen... prenos mi ripozon !

ĴAFETO.

Se mi ripozi povus, mi vin sekvus !

IRDO.

Ĉu vi ne venas al tendaro nia ?

ĴAFETO.

Ne, Irdo !.. Mi aliras al ĉi tiu
Kaverno, kies kavoj, oni diras,
Ebligas vojon al subtera mondo,
Irejon por eliro de Spiritoj
Loĝantaj tie, kiam ili venas
Vagadi sur supraĵo de la Tero.

IRDO.

Por kion fari vi aliras tien ?

ĴAFETO.

u - u⁴

Mi kaŝos akrecon de mia malĝojo
En mez' de mallumo ne malpli malĝoja !...
Espero forflugis el tie !... kaj el mi !...

IRDO.

Sed tiu ĉi loko... danĝera ! kaj strangaj
Aperoj kaj bruoj ĝin faris terura ?
Kun vi mi kuniros !

ĴAFETO.

Ne, Irdo, min kredu !
Nenion malbonan mi pensas... Nenion
Mi timas !

IRDO.

Malbono vin ankaŭ pli trafos !
Vi iru alien !.. aŭ kune ni !

JAFETO

Irdo,

Ne ! Sola mi iros !..

IRDO.

Nu do al vi Paco !..

(Li foriras)

SCENO III.

ĴAFETO - UU³, - U.

Paco !.. Mi serĉis ĝin kie ĝi devus troviĝi !... en Amo !..
Serĉis mi tiel fervore, ke eble mi devus ĝin trovi !
Ve !.. Mi renkontis, anstataŭ ĝin, pezon sur koro, premantajn
Pensojn, kaj tagojn malĝojajn, kaj noktojn sendormajn !.. Ĉu Paco
En malespero !.. Senmov', trankvilec' de senvoja arbaro
Kies silenton nur rompas ventego tra branĉoj ĝemantaj...
Tia... senmovo maldolĉa de mia anim' premegata !
Tero kulpiĝis !.. kaj signoj multnombraj kaj gravaj proklamis
Ŝanĝon proksiman, kaj punon teruran al ĉiuj mortemaj !
Anjo ! Ho kara ! En horo fatala, en kiu la maro
Ŝprucos el fontoj senfundaj kaj ne elĉerpeblaj, sur mian
Koron vi estus povinta rifuĝi, kaj trovi subtenon !
Tiu ĉi koro, pro am' al vi ĉiam sopiris... senfrukte !
Ĝi, pli senfrukte ankoraŭ premigos dolore, se l'via...
Dio ! Ke Via Kolero almenaŭ indulgu al Anjo !
Sankta ŝi staras en mezo de kulpa homaro kaj same
Kiel ŝi, stelo radias en mezo de nuboj, kovrantaj
Ĝin iafoje, sed ĝin ne povantaj estingi ! Ho kara
Anjo ! Ho kiel mi estus aminta vin ! Sed vi min puŝis
For ! Kaj mi volus ankoraŭ vin savi, kaj vidi vin viva,
Kiam akvego senlima funebre surkovros la Teron,
Kiam nenia ŝtonego elstaros al Leviatano
Reĝo de maroj senbordaj kaj de Oceano Tutmonda ;
Kiam mirigos ĝin mem senfineco de ĝia Regejo !

(Li foriras).

SCENO IV.

NOO, SEMCJO.

NOO.

- u ° Kie estas do Ĵafeto, frato via ?

SEMCJO.

Li foriris kiel diris li, al Irdo
Laŭ kutim' ! Sed mi pli time kredas, ke li
Iris al tendar' de Anjo, ĉirkaŭ kiu
Li vagadas dum la nokto, kaj similas
Je kolombo flugetanta ĉirkaŭ sia
Detruita nest' !... aŭ eble li aliris
Al kaverno, tien, flanke de Araro !...

NOO. uu - °, u

Ho ve ! Kion li faras... en tiu ĉi loko danĝera
De la Tero, sur kiu jam estas malbonoj sennombraj ?
Kunveniĝas ĉi tien estaĵoj timindaj pli ol la
Malbonuloj ! Ĵafeto ne ĉesas amegi filinon
De deven' malbenita de Dio ! Kaj certe ne povas
Li edziĝi kun ŝi, eĉ se tiu ĉi volus lin ami !
Malfeliĉa ho koro de homoj ! Ve ! Filo de mia
Familio kaj sango ! Scianta pri krimoj kaj sorto
De ĉi tiu epoko ! Scianta, ke hor' proksimiĝas !
Ĉu li povas sin ĵeti al kulpaj ĉi tiuj plezuroj ?...
Sed konduku min !.. Estas necese, ke mi lin retrovu !..

SEMCJO.

Vi ne iru pli longe, ho paĉjo ; mi serĉos Ĵafeton !

NOO.

Vi ne timu pri mi ! Malbonula Spirito ne povas
Malutili al iu amata de Dio !... Ni iru !

SEMĈJO.

Al tendaro de tiuj fratinoj ?

NOO.

Ne !... Al la kaverno !...

(*Ili foriras*).

SCENO V.

ĴAFETO.

u - u⁴ Ho lokoj senhomaj ! Vi ŝajnas eternaj !
Kaverno profunda kaj ne mezurebla !
Montaro multforma kaj bela, terura
Pro kruda majesto de viaj ŝtonegoj,
De arboj altkreskaj, miksantaj radikojn
Kun ŝtonoj tavolo pendantaj kaj kiujn
Atingus sen tremo neniu mortema !
Vi ŝajnas eternaj !... Jes !... Tamen post iom
Da tagoj, .. kaj eble, post iom da horoj,
Akvego terura vin rompos, renversos !
Ondaro potenca, bruega, plenigos
Mallumajn kavaĵojn de tiu kaverno,
Irejo al Mondo subtera, kaj super
Kuŝej' de leono tranagoŝ delfenoj !...
Kaj Homoj !.. Mortemaj !.. Ho fratoj !.. Ĉu sola
Mi devos ĝemadi sur via tombego ?
Ĉu iu postvivos el vi por ploradi ?
Pli ol vi, ĉu estas mi, inda je vivo ?
Ve ! Kio fariĝos bellokoj sur kiuj
Mi pensis pri Anjo, en temp' de espero ;
Kaj lokoj silentaj (ĉu ankaŭ ne karaj ?)
Sur kiuj sopiris mi kun malespero !
Ĉu vere ? Flueg' ondiĝanta surkovros
Ĉi tiun altaĵon fieran, kaj supron

Brilantan, similan je stel' malproksima !
Ĉu Sun' leviganta ne tuŝos plu, kaj ne
Forpelos plu nuban vaporon, naĝantan
Sur ĝiasupraĵo ? Ĉu ankaŭ mi, tien
Ne vidos plu larĝan vesperan sundiskon
Subiri post pinto de l'Monto plej glora,
Kaj lasi sur supro brilegan lumkronon ?
Ĝi estus *neniam plu* monda lumturo,
Anĝela haltej' plej proksima de steloj ?
Ĉu vortoj : *neniam plu*, estus diritaj
Pri vi kaj pri ĉio, escepte pri ni, kaj
Pri la kreitaĵoj rampantaj, savotaj
De patr' obeanta Ordonon Ĵehovan !
Ĉu povos li savi ĉi tiujn ? kaj ĉu mi
Ne povos plej ĉarman filinon teranan
Fortiri el sorto trudita neniel
Eĉ al la serpentoj kaj la serpentinoj ?
Ĉu povos la raso de tiuj rampaĵoj
Minaĉi per sia pikilo al ia
Novmond' eltirita el ŝlimo ŝaŭmanta,
Restaĵo kovranta la mondon malnovan,
Kaj memorigaĵo, en mondo pli alta,
Pri tiom da nunekzistantaj estaĵoj ?
Ho tago terura ! Mortantoj sennombraj !
Ho Mond' admirinda kaj juna, kreita
Por morti ! Doloro sur vin mi rigardas
Dum tago kaj nokto ! Kaj tagojn kaj noktojn
Restantajn al vi, mi pasigas kun trem' !... Mi
Ne povas vin savi !... Mi povas nenion
Por savi eĉ tiun ĉi, kies amego
Vin estus farinta pli kara al mi ! Ve !
Kreita el parto de via polvaĵo,
Mi ploras pri via proksima defalo !
Ho Dio potenca ! Ve ! Ĉu Vi permesus...

(Li ekhaltas en parolado. Bruo aŭdiĝas el la kaverno,
poste, ekridoj. — Spirito eliras kaj preterpaŝas).

SCENO VI.

ĴAFETO, SPIRITO.

ĴAFETO.

o -^a, o Je Nomo de Plejsupra ! He ! Vi kiu ?...

SPIRITO.

Ha ! Ha !

ĴAFETO.

Pro ĉio sankta sur la Tero !
Parolu !...

SPIRITO.

Ha ! Ha !

ĴAFETO.

Pro Akveg' proksima !
Pro Tero, kiun maro tuj surkovros !
Pro plenaj fontoj de Profundegajoj !
Pro Firmamento, kiu faros nubojn
Torentoj ! Pro Ĉiopovec' kreanta
Kaj detruanta ! Ho vi, nekonata
Fantom' terura kaj timiga, al mi
Respondu !... Kial tiu korsiranta
Krieg' ?...

SPIRITO.

Kaj vi, pri kio vi malĝojas ?

ĴAFETO.

Pri Tero, kaj pri ĝiaj idoj !

SPIRITO.

Ha ! Ha !

(*La Spirito foriras.*)

SCENO VII.

ĴAFETO.

- u u⁴, - u Tiu Spirito mokridis pri homaj doloroj,
Kaj fariĝonta detruo de l'Mondo, al kiu
Suno lumigos kun varmo senfrukta por vivo !
Tero silentas ! Kaj kiel ĝi, ĉiuj vivantoj
Dormas en tago proksima je venko de l'Morto !
Kial vekigis do tiuj por trovi ĉi tiun ?...
Kion mi vidas ?... Ho ! Kiaj do estas ĉi tiuj
Strangaj estaĵoj, similaj je Morto mem ?... Ili
Inter si voĉas per sama elson' de parolo
Kiel estaĵoj naskitaj pli frue ol tiu
Mond' finiĝonta, kaj ŝovas sin kiel nubaroj.

(Kelkaj Spiritoj eliras el la kaverno).

SCENO VIII.

SPIRITO, ĴAFETO.

SPIRITO.

u - u⁴ Ni ĝoju ! La ras' malaminda, ĝi kiu
Ne povis konservi Edenan feliĉon,
Kaj kiu sopiris pri scio senpova...
Ĝi nun tuj pereos !.. Ĝi ne detruigos
Kun malrapideco, nek iom post iom,
Nek ankaŭ per glavo, dolor', maljuneco !
Ĉar al ĝi jen tago la lasta ! La Tero
Nur estos marego ! Sur vasta supraĵo,
Nenio aŭdiĝos krom blovo de ventoj !
Anĝeloj lacigosflugilojn por serĉi
Haltejon ! El mezo de tiu ondegas

Tombejo, nenia ŝtonego elstaros
Por savon ebligi al hom' senespera,
Aŭ montri la lokon sur kiu li mortis
Kun lasta rigardo al tiu ĉi maro
Senlima, kaj kies forflu' esperata,
Ne por li, fariĝos !... Kaj ĉie detruo !...
Kaj ĉie ruinoj !... Kaj regos vivulojn,
Anstataŭ la Ter', Elemento alia !
Ne vivos plu la malamega idaro
De ŝlimo ! El ĉiuj koloroj sur Tero
Nur restos kolor' samnuance lazura !
Ne montoj multformaj, sed vasta plataĵo !
Ĉiaĵo ŝanĝiĝos ! La cedro, la pino
Ne levos plu supren ĉefbranĉon, kovritan
De tiu ĉi superakvaĵo tutmonda !
Homaro, kaj Tero, kaj fajro mortiĝos !
Ĉielo kaj maro senfine vastiĝos,
Sen vivo... pro La Eternulo ! Ĉu iu
Konstruus ŝirmejon sur ŝaumo de ondoj ?

Ĵ A F E T O.

(alirante)

u - u⁴ Jes, iu !.. Li, paĉjo !.. De l'Tero la semo
rimoj Neniĉiel perdiĝos, kaj nur malbonemo
sinsekvaĵ Foriĝos por ĉiam ! Forkuru, venkantaj
Demonoj inferaj, terure krientaj
Pro ĝojo, ke Dio detruos ĉi tion
De kio vi mem ne detruus eĉ ion !
Rapide forkuru ! Forkuru al via
Profunda kaverno ! Kaj maro, en ĝia
Malluma kuŝujo vin sekvos, disigos
Vin, vian malbonan anaron forigos,
Por ĵeti ĝin mezen de turnoventegoj
En vasta, senfina supraj' de spacegoj !

SPIRITO.

u - u⁴ Ho Fil' de l'Savota ! Tuj kiam saviĝos
rimoj Vi kun familio el danĝeroriĉaj
alternaj. Teruraj penadoj, kaj por vi foriĝos
Ondegaj bariloj... ĉu bonaj, feliĉaj
Vi estos ?... Ne !... Ĉiam, Malbon' malutilos
Novmondon, novrason ! Ve, via idaro
Per sia beleco, longvivo, similos
Neniel al nuna glorgrandegularo
Fiera pro sia Ĉiela deveno ;
Ĝi, kvankam el Teraĵ virinoj naskita !
El tempo estinta nur restos ĉagreno ;
Kaj ĉu vi ne estos, vi mem, hontigita
Postvivi, kaj poste ebligi naskiĝon
De idoj mortemaj ? Ĉu tiel malbrava
Vi, kaj senkuraĝa, por ke la sciiĝon
Pri tiu detruo tutmonda plej grava
Vi povu sen kora ribelo toleri ?
Ĉu en vi, ne sentas vi noblan korŝiron
Por brave teruran ondegon preferi
Anstataŭ ol serĉi, kun patro, eliron
Por via saviĝo, kaj iam loĝadi
Sur tombo de l'Tero ! Se ia vivulo
Post sia Tutraso preferus vivadi,
Li estus nur malkuraĝul' aŭ blindulo !
u - u⁴ Pro raso, malamas ni unu l'alian !
ŝanĝo de Ni estas el rasoj malsamaj, kontraŭaj !
alterneco. Anĝeloj, ni lasis en tempoj antaŭaj
Ĉe trono ĉiela la kronon radian,
Kaj loĝis en tiu ĉi lok', malvolinte,
Ke fratoj solece suferu sur Tero !...
Nu, iru, kaj vivu de nun en mizero
Aliajn mizeraĵn estaĵojn naskinte !

Kaj kiam ruinojn surkovros ondaro,
Enviu al grandegularo mortinta,
Kaj malestimegu al Patro restinta,
Kaj ankaŭ al vi... vi el lia idaro !

SCENO IX.

HORO, ĴAFETO, SPIRITO.

HORO.

u - u'

Ni ĝoju ! La voĉo de l'Hom' silentiĝos ;
Per preĝoj ne ĝenos plu niajn traflugojn !
Tuj ĉesos adoroj ! Ni ankaŭ de longe
Neniel adoras plu Dion, Lin, kiu
Postulas alpreĝojn kaj vidas ofendon
Eĉ en la forges' de ofero ! Ni vidos
La fontojn maldolĉajn refari Ĥaoson,
Ni vidos pereon de Homoj fieraj
Pro sia konsisto el vanta polvaĵo !
Ilia ostar' blankiĝinta pavimos
Kavernojn, valfundojn, kavaĵojn de montoj,
Kaj tie ĝin trafos ondego de maro !
Bestaroj mem, pro malespero, ĉesigos
Atakojn al Homo, kaj interbatalojn !
La tigro mortiĝos ĉe flank' de ŝafido,
Similaj je fratoj suĉintaj samlakton !
Ĝis kiam ĉiaĵoj, krom la Firmamento
Fariĝos silentaj, malestos kiele
En tempoj antaŭaj al kreo de l'Mondo !
Mallonge prokrastas la Morto ! Ĝi lasos
Postvivi nur erojn de l'nunvivantaro,
Por al si prepari novmondan akiron !
Ĉi tiuj restontoj, savitaj per naĝo
Sur lastaj ondegoj de superakvego,
Ĉeestos al kreo de novvivantaro
Tirita el tiu polvaĵ' sekiĝinta ;

Ĝi donos al Tempo novanojn, novjarojn,
Kaj novajn malsanojn, dolorojn, kaj.. krimojn!
Ĉi tiuj tiamaj estaĵoj kunvivos
Kun ar' da malamoj, laboroj... ĝis kiam...

ĴAFETO (*interrompas*).

...Ĝis kiam la Povo Eterna bonvolos
Klarigi sekreton de Bon' kaj Malbono...
Ordoni finiĝon de l'Tempo... de ĉio...
Ĝis kiam, sub Liaj Potencaj Flugiloj
Estaĵoj ekvidos finiĝon Inferan.
Kaj Ter' sanktiĝinta (kaj bela ĝi kiel
En tempo unua) retrovos Edenan
Feliĉon en la Paradizo senfina,
En kiu la homoj ne pekos plu, kaj eĉ
Demonoj mem La Plejjustulon adoras!

SPIRITOJ.

Sed kiam fariĝos ĉi tiu miraĵo?

(*Neregulaj
alternaj*)

- u², u - u²

u - u⁴

ĴAFETO.

Kiam venos La Elaĉetonto
Unue kun larmoj, kaj poste, kun gloro!

SPIRITOJ.

Nun batalu, en mortaj katenoj,
Ĝis kiam la Ter' maljuniĝos; batalu
Kontraŭ vin mem, Ĉielon, Inferon;
Ĝis kiam nubar' makuliĝos per sango
Kiu ŝprucos el kampoj batalaj!
Fariĝos novtempoj kaj novaj klimatoj
Novaj artoj kaj nova homaro!
Sed ĉiam la krimoj malnovaj, kaj larmoj
Supervivos kun ŝajnoj multformaj
En via nova raso!

u - u, - u²

La samaj turmentoj de pensoj detruos
Estonton, kiel baldaŭ
Ondeg' Oceana surkovros tombarojn
De gloraj Grandeguloj !

ĤORO.

u - u⁴ Ho fratoj ! Ni ĝoju !... Mortulo adiaŭ !...
Aŭskultu, aŭskultu !... Jam povas ni aŭdi
El la malproksimo teruran bruegon
u - u³ De l'maro kreskanta, muĝanta !
Jen ventoj pretigas flugilojn !
Jen nuboj ekverŝas torentojn !
Jen fontoj senfundaj ŝprucegas !
Ĉielo malfermas barilojn al ondoj !
Kaj granda frataro de Homoj
- u², u - u Vidas, sed ne komprenas
Ĉiun montron fatalan ;
Kvazaŭ ĝiaj okuloj
Estus blindaj naskiĝe !
Alterneco po² Bruon ni aŭdas ! Homaro ne povas ĝin aŭdi !
- uu⁴, - u Aro de l' tondroj kuniĝas, minacas de alte !
- u², u - u² Prokrastiĝas ekfaro nur iom ;
Fulmotondrojn antaŭeirantajn
Vidas nur solaj Spiritoj ! Ho ĝemu ! ĝemadu
Vi Universo ! Vi juna ankoraŭ ! Vi estas
Pli proksime de via finiĝo
Ol de via unua naskiĝo !
Teraj montaroj ! Vin kaŝos la Superakvego !
Barko rompiĝos, frapante al viaj ŝtonegoj !
Tie kuŝos konkajoj de l'maro
Kie hejmas idaro de l'aglo !
Ĝia kriego traflugos sur mar' senkompata !
Vane ĝi vokos al siaj malfortaj aglidoj :
Alterneco po² Al ĝi ondeg'o respondos sola !...
u, u - u², - u Homo pri ĝiaj flugiloj larĝaj
u - u⁴ Sopiros ! Flugiloj senpovaj por savo
Senfrukte baraktus por trovi haltejon.

Alterneco po²

- v², v - v² Kiam estos sur vasta supraĵo
 - vv⁵, - v Nur malluma tombejo de ondoj !
 Fratoj ! Ni ĝoju, kaj brue kriadu per voĉoj timigaj !
 Tuta homaro pereos, krom raso malgranda de Setho,
 Protektata ĝi kontraŭ la Morto
 Por daŭrigi senfine dolorojn !

v - v⁴ Ne restos eĉ unu el idoj Kainaj !
 Kaj ĉiuj ĉi tiuj amindaj filinoj
 Sterniĝos sur fund' de akvego mortiga,
 Aŭ sur la supraĵo, renverse flosantaj,
 v - v³ Kun dise iĝintaj harligoj,
 Ekŝajnos riproĉi Ĉielon,

Alterneco Ke Ĝi senvivigis la belajn kreaĵojn,
de v - v⁴ Tiel belajn eĉ en Morto !
kun - v⁴ Fatala Ordono jam ne prokrastebla !
 Ili ĉiuj ekpereos !

Alterneco Post bruo de ĉiuj elvoĉoj de Homoj,
de v - v⁴ Fariĝos silento Tutmonda !
kun v - v³ Forkuru, frataro, forkuru ! Sed ĝoju !
 Ni falis ! Homaro tuj falos !
 Pereu ĉi tiuj Ĉielmalamikoj
 Malfortaj, timantaj Inferon !

SCENO X.

ĴAFETO.

v - v³, v Proklamis Dio punon al la Tero !
 Ĝin jam anoncis Sankta Orakolo !
 Demonoj en la fundo de kavernoj,
 Kaj Libro de Enoko, jam de longe,
 Ĝin antaŭdiris (tiu ĉi en paĝoj
 Misteraj, kies senco, al spirito

Altrafas rekte pli ol tondr' al aŭdo !)
Kaj tamen Homo ne aŭskultis, kaj ne
Aŭskultas eĉ nun ! Blinde, li travivas
Al sia perdo, kies proksimiĝo
Ne pli impresas lian nekredemon,
Ol lia plorokri' impresos venĝon
De Di', aŭ maron al Li obeantan !
Nenia sign' aperas en aero !
La nuboj estas nun malmultenombraj ;
Koloro de l'vaporoj ne ŝanĝiĝis !
La Sun' lumigos al la lasta tago
De l'Tero, same kiel al l'unua
De l'kreo, kiam Dio diris : « Brilu ! »
Kaj Sun' ekbrilis. — Ĝia lum' ne povis
Jam esti por la Homo ne kreita ;
Sed ĝi inspiris, antaŭ homan voĉon,
Pli dolĉajn kantojn de flugamaj birdoj
Por al Ĉiel' saluti ĉiutage
Pli frue ol la idoj de Adamo.
Matenajn ĥorojn tuj komencos birdoj ;
Tra hela Oriento ili kantos ;
Kaj tag' brilegos, eble, lastan fojon ?
Post kelkaj horoj, birdojn lacigitaj
Flugiloj ne subtenos en aero.
Kaj post nemultaj sunleviĝoj... tago....
Ha, brilos ĝi, sed... super kio?... super
Ĥaoso, tia kiel antaŭ Lumo,
Kaj kies refariĝ' detruos Tempon !
Ĉar sen la viv', por kio servas horoj ?...
Ne pli por la polvaĵo, ol utilas
La Eterneco al Ĵehovo, Kiu
Jam kreis Tempon, ankaŭ Eternecon !
Sen Dio... Eternec', nur malpleneco !
Por Homo Temp' kreita ĉesos kun li ;
Ĝi falos en eternan fundon, kiam
Homaro detruig'os en akvego
En kiu malaperos juna Mondo !...

Sed kion vidas mi?... Estaĵojn, unujn
Teranojn, kaj aliajn Aeranojn!
Ne! Ili ĉiuj estas Ĉielanoj,
Kaj ili tiel belaj, tiom kiom
Mi povas vidi el la malproksimo!
Gracie ili venas de la monto
Malsupren, kaj traflugas nubetarojn!
Ĉar ili venas post la malbelegaj
Spiritoj, kies senmortec' infera
Malpian himnon de l' triumf' aŭdigis,
Ĉi tiuj kreitaĵoj ĉarmas, kvazaŭ
Alvenus ili al mi el Edeno,
Sciigi eble al mi pri prokrasto
Pri kiu ofte petis mi por Mondo!
Jen ili!... Anjo!... Dio!... Ho! Kaj kun ŝi!...

SCENO XI.

SAMIASO, AZAZIELO, ĴAFETO, ANJO,
AHOLIBAMO.

SAMIASO.

u - u⁴ Ha! Jen Adamido!...

AZAZIELO.

Por kio ĉi tie
Terido, dum dormas tutraso de Homoj?

ĴAFETO.

Por kio, Anĝel', vi ankoraŭ sur Tero,
Kaj ne en Ĉielo, en loko deĵora?

AZAZIELO.

Ne scias aŭ eble forgesis vi, ke ni
Deĵoras sur Tero!

ĴAFETO.

La bonaj Anĝeloj
Nun ĉiuj foriris el Ter' kondamnita!
Malbonaj Spiritoj mem kuras for antaŭ
Ĥaoso ! Ho Anjo, objekto al amo
De longe silenta sed ĉiam fidela,
Pro kio vi sekvas ĉi tiun Spiriton ?
Ĉar jam nun, neniam Anĝelo forestas
De sia plej alta Ĉiela sidejo !

ANJO.

Ĵafeto, mi al vi ne povas respondi !...
Mi petas, vi al mi pardonu !

ĴAFETO.

Ĉiel' ne
Pardonos plu baldaŭ ! Ĝi tamen pardonu
Nun al vi ! Vi falis en tenton danĝeran !

AHO.

Reiru al via fratar' ! Tro fiera
Ideto de Noo ! Ni ja, vin ne konas !

ĴAFETO.

Kredeble, vi baldaŭ min konos pli bone !
Fratino ĉi scias, ke mi ne ŝanĝiĝis !

SAMIASO.

Ho filo de la Patriarko, li ĉiam
Fidela al Dio ! Pro kia ajn kaŭzo
Vi estas ĉagrena (ĉar aŭdas mi, ke vi
Parolas sopire, kolere), ĉu do mi
Kaj Azazel' al vi faris ofendon ?

ĴAFETO.

... Ofendon ! Plej gravan, jes, el la ofendoj !
Sed prava vi estas ! Neniam mi povis

Meriti ŝin, kvankam filinon de l' Tero !
Adiaŭ, ho Anjo ! Ĉi nomon mi ofte
Ripetis, kaj mi ĝin lastfoje rediras !
Anĝelo, aŭ kia ajn estas vi, kio
Ajn estos vi baldaŭ.. ĉu povas vi savi
Ĉi tiun... ĉi tiujn du belajn filinojn
De ras' de Kaino ?

AZAZIELO.

Ĉu ili bezonas

Nun savon ?

ĴAFETO.

Ĉu povas vi tion ne scii ?
Anĝeloj, Anĝeloj, en peko de l'Homo
Vi jam partoprenis, kaj vi partoprenos
En pun' aŭ almenaŭ en miaj bedaŭroj !

SAMIASO.

Ho ! Kiaj bedaŭroj ? Ĝis nun mi ne pensis,
Ke ido Adama sukcesus paroli
Al mi per enigmoj !

ĴAFETO.

Ĉu la Ĉiopova
Ne ilin klarigis ? Ve !... tial... vi estas
Perditaj... kun ili, kaj same perditaj !

AHO.

Nu ! estu tiele ! Se ili nin amas
Kiele ni ilin nun amas, ja, ili
Ne timos pli, antaŭ mortema malforto,
Ol timus mi antaŭ senmorta doloro,
Se devos mi senti ĝin kun Samiaso !

ANJO.

Fratino ! Fratino ! Ne tiel parolu !

AZAZIELO.

Vi timas, ho Anjo !

ANJO.

Jes !... por vi !... volonte
Fordonus mi vivon restantan, por ke vi
Senmorta, ne ploru eĉ unu momenton !

ĴAFETO.

Ha ! Ĉu do pro li... pro ĉi tiu Serafo,
Vi ĵetis min for !... Sed ĉi tio ne grava,
Se Dion Mem vi ne forlasis samtempe !
Ĉi tiuj kuniĝoj de Senmortemulo
Kun ino mortema, ne povas fariĝi
Feliĉaj kaj sanktaj ! Sur Tero ni devas
Labori kaj morti ! Kaj estas kreitaj
Ĉi tiuj por serv' al Plejalta... Sed tamen
Se povas li savi vin, baldaŭ necesos,
Ke al vi li donu anĝelan kunhelpon !

ANJO.

Pri mort' li parolas !

SAMIASO.

Paroli pri morto
Al ni, kaj al tiuj ĉi kun ni ! Se li ne
Vidiĝus en ega malĝojo... mi ridus !

ĴAFETO.

Mi timas, malĝojas ne pri mi, mi estas
Savota, ne pro la personaj meritoj,
Sed pro la meritoj de patro justama,
Li, kies indeco sufiĉas por savi
Eĉ lian idaron ! Ha ! Se nur li povus
Multigi povecon por savon ebligi !
Almenaŭ se povus mi vivon fordoni
Por tiu ĉi, kiu min farus feliĉa !...

Por Anjo, la lasta kaj la plej aminda
En ras' de Kain'! Ŝi enirus arkaon
Kun anoj de posteularo de Setho!

AHO.

u -^s, u Ĉu pensas vi, ke ni, samsangaj kiel
Kain', l'unua filo de Adamo,
Naskita en Edeno, ni kunirus
Kun vi, idar' de Seth', la lasta frukto
De maljunaĝo de Adamo? Ne, ne,
Eĉ se ĉi tio devus savi Mondon
Tuj pereontan! Nia raso ĉiam
De l'via apartiĝis!... Kaj ĝi tiel
Vivados!

ĴAFETO.

Aho! Mi ne alparolis
Vin! Ĉar, ve, vi enhavas tro da sango
De tiu homo, kiun vi ĵus gloris!
Li kiu, la unua, verŝis sangon,
Kaj sangon fratan! Sed vi, mia Anjo,
Permesu, ke mi diru: « Anjo mia »,
Eĉ kvankam vi ne volas esti « mia »!
Delasi tiun nomon mi ne povas!
Kaj tamen mi delasi devas vin mem!
Ho Anjo mia! Pensis mi: Abelo
Filinon naskis, kies pia sango
En vi postvivas... vi malsama tiel
Al idoj de Kaino per dolĉeco;
Nur per beleco sama kiel ili!

AHO (*interrompas*).

Ĉu volus vi, ke estu ŝi simila
Je malamik' de nia patro?... Se mi
Ekpensus tion... se mi kredus, ke ŝi
Enhavas en si ion de Abelo!...
Foriru, fil' de Noo!.. Vi elvekas
Malamon!...

ĴAFETO.

Tion faris via patro,
Filin' Kaina !

AHO.

Sethon li ne buĉis !
Pro kio vi okupas vin je aĵoj
Aliaj, inter li kaj lia Dio ?

ĴAFETO.

Vi estas prava ! Lia Di' lin juĝis !
Ne estus mi nominta lian krimon
Se vi ne estus vin glorinta pro li,
Anstataŭ ol forpeli penson pri li !

AHO.

Li estis ja la patro de la paĉjo,
Naskita la unua de la Homo,
Kaj la plej forta, brava, malfeliĉa
El ĝiaj filoj ! Ĉu mi hontus pri li,
Al kiu ŝuldas mi la vivon ? Vidu,
En mia raso, virojn, kaj iliajn
Altkreskon, kaj belecon, kaj kuraĝon,
Kaj nombron de iliaj vivotagoj !

ĴAFETO.

Kalkul' nun plenumita !

AHO.

Tiel estu !
Sed tiel longe kiel ili vivos,
Mi gloros min pri patroj kaj pri fratoj !

ĴAFETO.

La patro, mia raso, sin nur gloras
Pri Dio sola !... Kaj vi, Anjo ?

ANJO.

Kiel

Ajn volos Dio Setha kaj Kaina,
Mi devas nur obei ! Sed se povus
Mi fari preĝon, dum ĉi hor' terura
De venĝo, (se ĝi venos !), mi ne petus
Postvivi sola post gefratoj miaj !
Fratino, ho fratino, kio estus
La Mondo, kio estus la Mondaro,
Kaj, kio estus estontec' plej brila,
Sen la feliĉo de la pasintaĵoj,
Sen amo via, l'amo de la paĉjo,
Sen ĉio, kio kun mi elnaskiĝis
Kaj kreskis, beligante kiel astroj
Ekziston mian per lumigo dolĉa !
Aholibam', se estos permesate
Esperi savon, serĉu, trovu ĝin !... Mi
Malamas morton, ĉar vi devas morti !

AHO.

Nu kio ? Ĉu impresis vin ĉi tiu
Revisto kun la ŝip' de sia patro,
Nur timigilo por la Mondo ? Ĉu nin
Ne amas du Serafoj ? Kaj ĉu decas
Petegi Noan filon ? Ho, prefere...
Sed tiun ĉi reviston erarigis
Turment' de pensoj pri sopiroj vanaj,
Dum lacigantaj maldormadoj ! Kiu
Movigos montojn, Teron ? Kiu diros
Al nuboj kaj fluegoj preni formojn
Aliajn ol ĉi tiujn, kiuj estas
Ĝis nun konataj de ni, dum ilia
Kurad' eterna ?... Kiu povus tion ?...

ĴAFETO.

Ĉi Tiu, Kies Vorto kreis ilin !

AHO.

La Vorton kiu aŭdis ?

ĴAFETO.

Mondo, kiu
Ricevis de Ĝi vivon ! Ha, malŝate
Nun vi ridetas ! Turnu vin al tiuj
Serafoj, se min ili ne pravigos,
Ne partoprenas ili kun Anĝeloj !

SAMIASO.

Aholibam', rekonu vian Dion !

AHO.

Kreinton nian ĉiam mi rekonis,
Ho Samias', Li via kaj Li mia !
Li Dio ama, kaj ne Di' dolora !

ĴAFETO.

Ve ! Kio estas am' se ne doloro ?...
Eĉ Tiu, Kiu ame kreis Teron
Malĝojis baldaŭ pri unuaj ĝiaj
Loĝantoj !

AHO.

Tion oni diras !

ĴAFETO.

Prave !

SCENO XII.

La samaj, NOO eniras kun SEMĈJO.

- u u⁵, - u

NOO.

Filo Ĵafeto ! Ho kion vi faras kun tiu idaro
De malbonuloj ? Ĉu vin ne retenas la tim' partopreni
Perdon ilian proksiman ?

ĴAFETO.

Ho Paĉjo ! Ĉu estus pekaĵo
Peni por savi estaĵon de l'Tero ?.. Nur vidu : nekulpaj
Ili, ĉar estas kun ili Anĝeloj !

NOO.

Jen estas do tiuj
Kiuj forlasas la Tronon de Dio por serĉi edzinojn
Inter idinoj Kainaj ! Jen estas la Filoj ĉielaj
Kiuj elserĉas filinojn de l'Ter', pro ilia beleco !

AZAZIELO.

Ho Patriarko, ĵus diris vi veron !

NOO.

Trifoje, ho ve al
Tiaj kunligoj ! Ĉu Di' ne disigis Ĉielon kaj Teron ?

SAMIASO.

Ĉu do ne estas kreita la Homo simila je Dio ?
Kaj ĉu ne amis Ĵehovo ĉi kion li faris ? Nu, same
Kiel Li, vete ni celas por amo al aĵoj amataj !

NOO.

Estas mi homo nur, kaj malkapabla por la similulojn
Juĝi, kaj multe pli ankaŭ por juĝi Estaĵojn Ĉielajn !
Sed ĉar Ĵehovo bonvolis paroli kun mi, kaj malkovri
Siajn Decidojn... respondas mi al vi, ke povas nenio
Bona troviĝi en kaŭzo iginta Serafojn forlasi
Lokojn senmortajn por veni en Mondon morteman,
[nedaŭran !

AZAZIELO.

Ho ! Eĉ por savi ?

NOO.

Eĉ ! Malgraŭ la Gloro per kiu vi brilas,
Estas senpovaj vi por elaçeti ĉi kion kondamnis

Tiu al Kiu vi ŝuldas la Gloron ! Kaj se vi ricevis
Vere Ordonon por savo, ĝi estus por savo de ĉiuj,
Kaj ne de tiuj du solaj idinoj Kainaj ! Jes ili
Belaj ; sed, malgraŭ belec', kondamnitaj !

ĴAFETO.

Ho paĉjo, retiru

Tiajn parolojn !

NOO.

Ho filo ! Ho fil' ! se vi volas eviti
Sorton ilian, forgesu, ke ili ekzistas, ĉar baldaŭ
Ili ne vivos plu !... Tiam vi estos la patro de nova
Mondo... de mondo pli bona !...

ĴAFETO.

Ho ! lasu min morti kun ili !

NOO.

Inda vi estus je tio, pro tiu ĉi penso ! Sed Tiu
Kiu decidis vin savi, vin savos !

SAMIASO.

Kaj kial lin kaj vin,
Kaj ne ĉi-kiun la filo pli amas ol sin mem kaj ol vin ?

NOO.

Tion demandu al Tiu ĉi, Kiu vin faris pli granda
Ol min kaj miajn, vin tamen devige obea al Lia
Povo... Jen venas plej dolĉa el Liaj fidelaj senditoj !

SCENO XIII.

La samaj, ĈEFANĜELO RAFAELO eniras.

RAFAELO.

u - u⁴ Anĝeloj, vi kies ĉeesto nur decas
Ĉe Trono Ĉiela, pro kio vi tie ?
Ĉu tiel plenumas vi devan oficon,
En horo por lasi sen helpo la Teron ?

Reiru, adoru, kaj servu per gloraj
Kantadoj kun sep Ĉefanĝeloj ! Vi devas
Dejori nun en la Ĉiel' !

SAMIASO.

Rafaelo,
L'unua, plej bela el Filoj de Dio,
Ĉu estas do malpermesate : Anĝeloj
Deiru al Tero ? Jehovo Mem, ofte
Bonvolis trapaŝi sur ĝia supraĵo.
Jehovo ja amis la Mondon ; Li kreis
Ĝin, por ke ĝi amu Lin ! Ofte, kun ĝojo
Ni venis sciigi pri Liaj Ordonoj.
Ni gloris Lin en plej malgrandaj kreaĵoj,
Ni zorgis pri tiu malforta idaro,
Simila je floroj en Dia ĝardeno,
Por gardi ĝin inda je Dio, kaj kiel
La lasta faraĵo de Lia Faremo !...
Sed via vizaĝo sin montras severa
Pro kio minaci pri falo baldaŭ ?

RAFAELO.

Se vi, Samiaso kaj Azazielo
Jam estus restintaj en loko dejora
Kun ĥoroj Anĝelaj, vi estus sciintaj
Pri lasta Ordon' de Jehovo, skribita
Per fajraj literoj ; kaj vi ne bezonus
Demandi pri Volo de Via Kreinto !
Sed ĉiam nesci' partoprenas en peko !
Sciencaj Spiritoj eĉ estas malindaj
Je si mem, se ili sin nutris per vana
Malhumilegeco ; kaj estas blindeco
L'unua el fruktoj de la malobeco !
La bonaj Spiritoj nun ĉiuj forlasis
La Mondon, en kiu vi estas logataj
De emo kontraŭa al via esenco,
Kaj peke kaptataj de am' al mortemaj !

Sed tamen vi estas nun senkulpigeblaj,
Vokitaj por iri al Viaj Samuloj,
Forflugu ! Forflugu ! Restante ĉi tie
Vi perdus la rajtojn de Bonanĝeleco !

AZAZIELO.

Kaj vi, se sidadon sur Ter' malpermesis
Ordon' ne konata ĝis nun, ĉu ne pekas
Vi, kiel ni, tien veninte ?

RAFAELO.

Mi estas

Veninta por peti vin ! Iru en vian
Ĉielan sidejon, je Nom' de Plejalta !
Mi venis por Liajn Ordonojn plenumi !
Mi ĝoje alportas pardonan parolon !
Ni ofte kunflugis tra spacoj eternaj,
Ni kune kunflugu reiren al astroj !
Jes, Tero pereos ! Jam preta tombejo
Por raso de Homoj ! Ho ! Kial la Mondo
Ne povis kreigi, kaj ne detruigi
Sen perdo da anoj en vicoj ĉielaj !
Ve ! Anoj senmortaj kun puno terura !
La frato Satano sin perdis, volinte
Ribelon pli ol ĝistiaman obeon !
Vi, malpli potencaj ol la Ĉefanĝelo
Falinta, pripensu pri lia falego !
Ĉu povus ĉi homaj filinoj kompensi
Ĉielan feliĉon, bedaŭron senfinan ?
Mi longe batalis, mi longe batalos
La malobeinton, nun plej bedaŭrantan
Pri sia naskiĝo, ĉar li ekrifuzis
Rekoni estrecon de Tiu Supera
Al la Ĉefanĝeloj sidantaj je l'dekstro
De Lia Glortrono, similaj je sunoj
Brilantaj per lumo de astro pli granda !
Mi amis lin ! Vere ! Escepte Ĉi Tiu
Kreinta lin, kia Ĉiela Potenco

Egalus, per sia beleco, Satanon ?
Mi volus esperi, ke iam, pardonon
Pri l'krim' li ricevos !... Ĉu eble malpia
Ĉi tiu deziro !... Sed vi, nun povantaj
Reiri al gloro, min aŭdu, aŭskultu !
— Kun Di' aŭ Satan', Eternecon akceptu :
Jen estas nun por vi la sola elekto ! —
Satan' vin ne tentis, ĉar nun la Anĝeloj
Ne povas plu fali en liajn kaptilojn !
La Homo atentis pri liaj konsiloj,
Sed vi ĵus atentis pri voĉ' de l'Virino,
Ĝi, pli deloganta mem ol la Serpento !
La voĉo serpenta perfidis ja malpli
Ol povas perfidi la kisoj virinaj !
Serpento faligis nur Teran Estaĵon ;
Virino minacas Ĉielon, ŝi volas
Al si, siavice, altiri armeon
Da ribelemuloj al Leĝoj Ĉielaj !
Ha ! Flugu ! Forflugu ! Vi estas senmortaj !
De kiam mortigis ĉi kiujn vi amas,
Vi ploros, plenigos aeron per ĝemoj
Pri polvo mortema, kaj kies memoro
Ligita kun via senmorta sentemo
Pli vivos ol Suno al Mond' lumiganta !
Pripensu, vi estas naskiĝe malsamaj
Je ili, kaj samaj nur por la suferoj !
Por kio heredi la malbenitaĵojn
Kun raso kreita por esti batita
De jaroj, frapita de timoj, tranĉita
De Morto, reganto sur l'aro de Homoj !
Se Dio kolera eĉ estus lasinta
Al ili ekziston, kaj estus doninta
Al ili la eblon vivdaŭre sin ŝovi
Sur ŝlimo el kiu jam ili naskiĝis,
Ĉu ili ne estus senĉese premataj
Kaj de la malbono kaj de la doloro ?

Ili forflugu ! Mi aŭdas la voĉon de la Sciiganto !
 Ĉiuj mortigos en aĝo pli juna ol tiu de niaj [vego
 Gloraj prapatroj ! La voĉo proklamas : « Jam Superak-
 « Preta en nuboj ; akvaro de profundegaĵoj elkreskos
 « Supren ĝis akvoj Ĉielaj ! » Kredeble malmultaj saviĝos !
 Raso Kaina senfrukte petegos al Dio Adama !
 Mia fratino ! Ĉar estas tiele, ĉar La Eternulon
 Vane ni petos, ke Li nin indulgu dum iom da tempo,
 Lasu ni tiujn ĉi, kiujn ni ĝis nun amegis ! Ni iru
 Kontraŭ ondegon, kiele eĉ kontraŭ tranĉilon ; korbate
 Eble, sed brave ! Ni ĝemos !.. sed malpli pri ni ol pri tiuj
 Kiuj postvivos je ni, en senmorta aŭ morta sklaveco !
 Kiam fariĝos finiĝo de Superakvego mortiga,
 Ili plorados sur tiuj ĉi, kiuj ne verŝos plu larmojn !
 Flugu, Serafoj, forflugu al viaj eternaj sidejoj,
 For de la ondoj kaj ventoj ! Por ni, la mortigo ; por vi, la
 Vivo eterna : jen estas la sorto al ni altrudita !
 Sola, K'reinto de l'Mondo nun scias plej certe pri kio
 Estas pli bona : ĉu vivo ? ĉu ia eterna soleco ?
 Vi do obeu Lin ; same obeos ni Lin ; sed ne volus
 Mi, ke (laŭ sama protekto donita al raso de Setho),
 Estu, dum hor', daŭrigata ĉi vivo de Li kondamnita !
 Vidu mi vin senigitajn je parto de Liaj Favoroj !..
 Viaj flugiloj tuj portos vin ĝis la Ĉiel', Samiaso ;
 Mia amego, nur, sekvos vin tien !.. Sen larmoj, okuloj
 Miaj ! ĉar la fianĉin' de Anĝel' fierege malŝatas
 Plori !.. Adiaŭ !.. Nun levu vin Superakveg'senkompata !

ANJO.

Morti ĉu devas mi ! Perdi vin ankaŭ ĉu devas mi ! Mia
 Azazielo ! Ho mia ! Ho koro !.. La kor' antaŭsentis
 Ĝuste, Ve !... Tamen mi, tiel feliĉa, esperis !.. Fatala
 Sorto ĉi tiu (Gi tiel terure timinda !).. min trafas
 Kiel batego ne antaŭvidita !.. Sed.. tamen, vi iru
 For !.. Ha !.. Pro kio ?.. Ne ! Mi ne retenas vin ! Mia
 [korŝiro

Daŭri ne povas!.. Sed via dolor' eterniĝus, se.. pro mi..
For la Ĉiel'... vi fariĝus pelita...! Jam nun vi tro faris
Por mi, filino de raso Adama!.. Ve!.. Nia proprajo
Estas doloro, kaj kiel ni, anoj ĉielaj, se ili
Amis nin devas elporti ĉagrenojn..., kaj la malfavoro
Trafas al ili!... L'unua al ni sciiginta sekretan
Scion defalis de sia seĝeg' ĉefangela, por iri
Ian sidejon kaŝatan! Vi, Azazielo... ne... vi ne
Estos..pro mi..malfeliĉa! Forflugu sen larmoj! Forgesu
Tiun, al kiu ondeg' senkompata ne trafos maldolĉe
Kiel en tiu momento!.. Forflugu! Forflugu!.. For via
Vido, ja, mi pli facile aliros al mort'!

^
JAFETO.

Ha! Ne diru

Tion!... Ho Paĉjo! Kaj vi, Ĉefangelo! vi kies vizaĝo
Restas severa, trankvila, radia!... Ĉiela kompato
Al ni sciigu, ke ili ne restos lasitaj sur tiu
Maro senfina..., ke nia ŝipego ne estos la ilo
Sola por savi vivulojn!.. aŭ faru, ke mi mem tuj'mortu!

NOO.

o - o' Silentu! Sklavul' de pasioj! Silentu!
Se koro malbenas, ke lang' ne insultu
Al Dio! Laŭ Lia Ordono vi vivu,
Eĉ mortu vi, kiel justulo, ne kiel
La raso Kaina! Sed ĝemu silente,
Kaj ĉesu lacigi Ĉielon per plendoj
Memamaj! Ĉu eble vi volus, ke Dio
Mem kulpa fariĝu por vi per la ŝanĝo
De Siaj Decidoj, pro emoj de Homo?
Jes, homo vi estas, sed viro vi estu!
Vi estas el Adamidaro, elportu
Ĉi kion ĝi devas kaj povas elporti!

^
JAFETO.

Jes, paĉjo; sed kiam ni solaj naĝados
Sur onda solaĵo, kaj ĝia profundo

Surkovros la Teron amatan kaj karajn
Amikojn kaj fratojn, ve, kiu do el ni
Sin povos deteni je larmoj kaj ĝemoj !
Ĉu povus ni trovi trankvilan ripozon
Sur tombo silenta de Homoj mortintaj ?
Ho Dio, Vi montru Vin Di' indulgema !
Nun tia Vi povas ankoraŭ Vin montri !
Sed ne renovigu Adaman mizeron !
Homar', jam, konsistis el du kreitaĵoj !
Hodiaŭ, ĝi estas anaro samnombra
Kiele ondaroj, pluvgutoj mortigaj
Per kiuj kovriĝos la tombo de idoj
Kainaj, se ili nur trovos tombejon !

NOO.

Silentu ! Malsaĝa ! Ĉar krimo en ĉiu
El viaj paroloj !... Kaj vi, Ĉefanĝelo,
Pardonu lin junan, ĉar li malesperas !

RAFAELO.

Serafoj ! Ĉi homoj pasie parolas !
Vi, kiuj nun estas, aŭ devus nun esti
Senpekaj kaj eĉ senpasiaj, revenu
Kun mi !...

SAMIASO.

Ne ! Ĉi tio ne estos !... Ni certaj
Pri nia elekt' !... Ni suferos !

RAFAELO (*al Azazielo*).

Ĉu same
Respondas vi ?

AZAZIELO.

Kion li diris, mi diras !

RAFAELO.

Vi ankaŭ !... Nu ! jam nun, vin Dio senigas
Je tuta ĉiela potenc' !... Malamikoj
De Via Kreinto, mi lasas vin !

ĴAFETO.

Kien,
Ve, ili foriros ? Aŭskultu ! Aŭskultu !
Jen sonoj mallaŭtaj... pli bruaj fariĝas,
Forsiblas el fundo de l' Monto ! Nenia
Ekmovo de l' vento ankoraŭ sentiĝas...
Sed, tamen, jen ĉiuj folioj tremetas,
Jen floroj defalas, jen Tero mem ĝemas ;
Ĝi, kiel de peza ŝarĝeg' premegata !

NOO.

Aŭskultu ! Aŭskultu !... Jen mara birdaro
Tremege pepias (1) ; ĝi kiel nubego
Makulas nun sur la Ĉiel' duberuĝa,
Ĉirkaŭeflugadas la supron de l' Monto,
Sur kiun neniu el ili kuraĝis
Rifuĝi eĉ dum plej timigaj ventegoj !
Ĉi tiu altaĵo fariĝos la lasta
Marbordo ! Kaj baldaŭ ĝi mem subakviĝos !...

ĴAFETO.

La Suno ! La Suno leviĝas ! Sed ne plu
Kun sia kutima beleco ! Rondforma
Nigraĵo, ĉirkaŭe de ĝia globego,
Proklamas, ke pasis beltagoj de l' Tero !
Kaj nuboj vidiĝas kun nokta mallumo,
Krom tiuj je randoj ruĝkuprekoloraj !

NOO.

Kaj vidu... Jen fulmo subite ekbrilas !

(1) *Pro ĝia laŭsona harmonieco, anstataŭ « pepadas ».*

Ĝi antaŭkuristo de l'Tondro !.. Ĝi venas !...
Forkuru ! Forkuru ni ! Al Elementoj
Forlasu ni kulpajn iliajn regatojn !
Ni kuru al sankta ŝipego ! Malfermos
Ĝi sian ŝirmejon for mardangeregoj !

ĴAFETO.

Ho Paĉjo, vi haltu !.. Ho vi ne forlasu
Nun Anjon karegan al ondoj mortigaj !

NOO.

Ne ! Nepre ni devas al ili forlasi
Ĉiajon vivantan !.. Ni iru !

ĴAFETO.

Ne !... Mi, ne !...

NOO.

Nu ! Mortu kun ĉiuj restantaj ! Ĉu povas
Vi vidi ĉielajn minacojn, kaj serĉi
Por sav' de estaĵo frapota de ĉio
Montranta koleron de Justa Ĵehovo ?

ĴAFETO.

Ĉu povas kuniĝi koler' kun Justeco ?

NOO.

Malpia ! Eĉ nun !.. Vi maltimas blasfemi !..

RAFAELO.

Ho vi Patriarko ! Ho montru, ke patro
Vi estas ankoraŭ ! Dolĉiĝu ! Ne mortos
Tuj fil' ; malsaĝul', li ne scias gravecon
De siaj paroloj !.. Li tamen ne devos
Perei sub ŝaŭmo de l'maro maldolĉa !
Sed post kvietiĝo de lia pasio,
Li, kiel vi, estos virtama, ne estos
Perdita kun tiuj ĉi homaj filinoj,
Nek kiel ĉi tiuj Estaĵoj Ĉielaj !

(Noo foriras).

SCENO XIV.

La samaj, escepte NOO.

AHO.

u -s, u Alproksimiĝas Fulmovent'akvego !
Ĉiel' kaj Ter' detruos kune vivon !
Ne povas kontraŭstari niaj fortoj
Al la Potenc' Eterna !

SAMIASO

Niaj fortoj
Alestos al vi ! Ni vin transflugigos
Ĝis ia astro malproksima, kie
Vi partoprenos nian sorton ; kaj se
Vi ne sopiros pri la Tero, baldaŭ
Forgesos ni Ĉielon ĵus perditan !

ANJO.

Tendar' de paĉjo kara ! Lok' de mia
Naskiĝo, montoj, valoj, arbaretoj,
Vi detruigis !.. Kiu min konsolos ?

AZAZIELO.

L'anĝelo, via edzo !.. Vi ne timu !
Ĉar, kvankam elpelitaj el Ĉielo,
Ni estras sur aliaj rifugejoj,

RAFAELO.

Ribela ! Vi malpie ĵus parolis !
De nun, vi malgrandiĝis en Potenco !
La fajra glavo, kiu jam forpelis
L'unuan homon el la Paradizo,
Rebrilas en la man' de Ĉefanĝelo !

AZAZIELO.

Neniel povas tiu nin atingi !
Minacu pri la morto Terpolvaĵon,
Parolu pri armiloj al malfortaj
Mortuloj, kiujn vundus tiaj batoj !
Sed kiel glavoj trafus Senmortulojn ?

RAFAELO.

Jen estas la momento, kiam vian
Fortecon vi elprovos, kaj vi fine
Ekscios kiom vanta estas ĉia
Ribelo kontraŭ Vol' de Via Dio !
Sur kredo nur stariĝis via Forto !..

(Mortemuloj eniras, forkuras, serĉante rifuĝejojn).

SCENO XV.

La samaj, ĤORO.

ĤORO DE MORTEMULOJ.

u - u⁴ Ĉielo kaj Tero malorde miksiĝas !
Ho Dio ! Ho Dio ! Ve ! Kion ni faris ?
Ho estu kompata por ni ! Nin aŭskultu !
Eĉ en arbaregoj, bestaro vin preĝas !
Drakono, rampante, sin ŝovas el nesto,
Alterneco Kaj senarmigita de propra teruro,
kun u - u² Kunestas kun homo !
Kaj birdojflugantaj vibrigas aeron
Per krioj korŝiraj !
Deturnu koleron, Ĥehovo, kompatu
Al Mond' senkuraĝa !
Vi kreis ĝin ! Ne nur homaro petegas,
Sed tuta Naturo !

RAFAELO.

Adiaŭ ! Adiaŭ ! Ve al Teridar' ! Mi
Ne povas, ne devas
Vin helpi !.. Jen Dia Ordon' plenumiĝas !
(*Rafaelo foriras*).

SCENO XVI.

La samaj, escepte RAFAELO.

ĴAFETO.

u -^s, u Nubaroj malaltiĝas !.. Unuj kiel
Vulturoj falas sur la akiraĵon,
Aliaj superstaras kiel ŝtonoj,
Ordonon novan jam nun atendante,
Por ekverŝegi la venĝontajn ondojn !
De nun la Firmamento plu ne estos
Lazurkolora, kun brilegaj steloj !
Anstataŭ Suno, ĵus leviĝis Morto !
Terura, pala Lun' aeron regas !..

AZAZIELO.

Ho Anjo, venu ! Lasu tiun grandan
Malliberejon, kien Elementoj
Alkuras por refari la Ĥaoson !
Flugiloj miaj tuj vin ŝirmos, kiel
Aglidon ŝirmas tiuj de l'aglino !
Ne miru, ke malord' renversas Teron !
Ne aŭdu ĉi terurigantan bruon !
En mond' pli brila ol ĉi tiu, vivon
Aeran vi enspiros ! Estas lokoj
Aliaj ol ĉi tiu nebulaĵo !..

(*Azaŝielo kaj Samiaso malaperas kun Anjo kaj Aholibamo.*)

SCENO XVII.

ĴAFETO. UU - 3, U

Jen do ili foriris, forkuris el bruo de Mondo
Forlasita !.. Ĉu ili vivados... ĉu ili, ve, mortos
Devigataj perej kun anoj aliaj de l'Tero,
Ho !.. Neniam plu mia rigardo ripozos sur Anjo !..

SCENO XVIII.

ĤORO, ĴAFETO, UNU PATRINO.

ĤORO DE MORTEMULOJ.

U - U⁴ Ho Filo de Noo ! Kompatu al fratoj !
Nu ?.. Kio ?.. Ĉu vi nin forlasos ?.. Vi trovos
Ŝirmejon en via savonta Arkao !

UNU PATRINO (*prezentas sian infanon al Ĵafeto*).

Ĉi tiun infanon akceptu en ŝipon !
Mi naskis lin en flankŝirantaj doloroj !
Mi estis feliĉa lin premi sur brusto !
Pro kio naskiĝis li ?.. Kion li faris ?
Sur filon ne debrustigitan nun, kial
Ĵehova kolero aŭ Lia forlaso ?...
Ho ! kio troviĝas en lakt' de ĉi mamoj
Igonta la Morton renversi Ĉielon
Kaj Teron por frapi infanon... la mian !
Kaj voki ondarojn sur tiun senkulpan ?..
Ho savu lin, filo de Setho !.. aŭ estu
Vi mem malbenita... kaj kune, Ĉi Dio
Kreinta vin, ankaŭ la tutan idaron
De Setho, maljuste amatan pli ol ni !..

ĴAFETO.

Silentu ! Ne hor' por malben' ... sed por preĝo !

ĤORO DE MORTEMULOJ.

Por preĝo ! Ĉu preĝoj altrafus Ĉielon ?
Amasa nubeg' proksimiĝis je Monto,
Ĝi miksas pluvegojn kun maraj ondegoj
Superbordiĝintaj, superakvigantaj
Eĉ en la dezertoj sablarajn supraĵojn !
Malbeno al Tiu kreinta vin... vin kaj
La patron ! Ve ! Niaj malbenoj senfruktaj !..
Ni devas pereii !.. Sed ĉar ni pereos,
Por kio ni preĝus kaj genufleksadus
Al la Ĉiopova, al Li senkompata !
Se Teron Li kreis, Li hontu pro tio,
Ke Li ĝin difinis por la suferadoj !..
Jen ili !.. Jen ili !.. Jen ondoj koleraj
Per kies bruego la Mond' konsterniĝas !
Jen superakviĝis arbaroj majestaj,
Kaj verdaj ankoraŭ en la maljuneco !
Ĉi arboj el Ter' elkreskigis unuajn
Branĉaĵojn de kiuj Edeno ombrigiĝis
Pli frue ol Ev' al Adamo alportas,
Kiele dotaĵo, la donon de l'Scio ;
Pli frue eĉ, ol mem Adamo ekkantas
La himnon unuan de sia sklaveco !
Ilian floraron detruis la maro
Superakviganta montarojn plej altajn !
Jen, sur nin senpovajn Ĉiel' malaltiĝas !
Ĝi tuŝas maregon, kaj Dion Mem kaŝas
Al niaj rigardoj petantaj por helpo !
Forkuru, ho filo de Noo, forkuru
En ŝipon, sur maro retrovu la pacon !
Vi vidos surflosi malvivajn korpajojn
De viaj amikoj dum via juneco !
Kaj tiam, per kantoj, redanku Ĵehovon !..

SCENO XIX.

HORO, ĴAFETO, UNU VIRINO.

UNU MORTEMA

Alterneco Feliĉaj, kiuj mortas en Sinjoro !
de u - ⁵, u Ho kvankam marego surkovras la Teron
kun u - u⁴ Adoru ni, obeu Lian Volon !
Li faris nin vivajn, Li prenas Siaĵon !
Se estus forprenota mia vivo,
Se mia malforta elvoĉo ne devus
Plu sin aŭdigi antaŭ Lia Trono,
Mi benu Sinjoron pri la pasintaĵoj,
Pri ĉio kio estas... Tempo... Spaco...
Eterno... Viviĝo... Mortiĝo... pri ĉio
Konata... kaj Senfino nekonata !
Li kreis, Li povas detrui !.. Kaj mi, pro
Elspiro senvalora de la vivo,
Blasfemus kaj ĝemus !.. Ne !.. Kiel mi vivis
Mi mortu, kun neŝancelebla kredo,
Eĉ kiam falegus la Tuta Mondaro !...

HORO DE MORTEMULOJ. - u u⁵, - u

Kien ni kuros ? Ĉu sur la altaĵojn de grandaj montaroj !
Ne !... Ĉar de ili, jen akvoplenegaj torentoj bruege
Sin deverŝegas renkonten al la Oceano, ĝi kiu
Jam altaĵetojn surkovras, kaj muĝas en ĉiuj kavernoj !

UNU VIRINO (*enirante*).

u - u⁴ Ho savu ! Min savu ! Jam nia valetto
Ne estas plu ! Oni ne vidas plu patron,
Nek fratojn, nek tendon, nek brutojn iliajn !...
Jam arboj, ombrejoj dum la tagovarmo,
Ŝirmejoj al birdoj dum ĉarmaj vesperaj

Kantadoj... jam la rivereto malvarma
Kaj verdaj paŝtejoj kuŝantaj sur bordoj...
Jen ĉio jam nun malaperis !.. Hodiaŭ
Matene, paŝanta sur flankoj de l' Monto,
Mi ame rigardis sur tiun sidejon....
Danger' ne minacis eĉ unu folion....

u - u, - u² Nun ĉio subakviĝas !
u - u³ Pro kio mi estas kreita ?

ĴAFETO.

u - u⁴ Por morti ! Por morti dum via juneco !
Pli ĝoja pro tiu ĉi sorto ol vidi
Tombegon de l' Mondo, pri kiu senfrukte
Mi nepre plorados ! Pro kio mi devas
Postvivi nun, kiam, ve, ĉiuj pereas !

(Marego kreskadas. — Homoj forkuras ĉiusflanken ; kelkajn atingas ondoj. — Ĥoro de Mortemuloj diskuras. Ili serĉas savon sur montojn.

Ĵafeto staras sur ŝtonego. — El la malproksimo, la Arkao alnagas al li.)

FINO